# I N F O R M I L O

*Esperanta tradicio – kultura heredaĵo en Kroatio (Z-7298/2019)*
***3-2026 (144) julio ĝis septembro***
***Esperanto društvo Rijeka* Esperanto Societo Rijeka***
***Blaža Polića 2 51000 RIJEKA Hrvatska-Kroatio***
Tel.++385(0)(51)334-670 lunde de la 18a ĝis la 20a horo
Naslovi na mreži-retadresoj: rijeka.esperanto@gmail.com
**Prezidanto: Emil Hrvatin tel: 091 882 2986**
**Redaktoro: Dr.sc. Ana Alebić-Juretić, dipl.ing. tel.: 091 563 1634**

Rijeko, la 25-an de oktobro 2026.

Karaj gesamideanoj,

Bedsaŭrinde, nia klubo perdis ankoraŭ unu tre gravan membron, la d-ro pri medicino Marija Ŝekulja, kiu krom sia profesia laboro, instruis Esperanton en la bazlernejo en Rijeka. Ni estas dankema al ŝi por ŝia dediĉo al Esperanto. Tiu ĉi somera numero de Informilo prezentas ankaŭ gravajn somerajn renkontiĝojn de esparantistoj kaj la lokaj agadoj. Ĝuu ĝin

**FORPASIS**

***MARIJA ŠEKULJA*** (Bezić), d-ro. med.



ŠEKULJA (Bezić) Marija naskiĝis la 26-an de februaro 1936 en Kranj (Slovenio). Doktoro pri medicino, specialisto pri okulmalsanoj (oftalmologio). Kiel kuracistino ŝi laboris en sia fako en Rijeka, unue en la malsanulejo, kaj poste en la Pediatria oftalmologio ĉe la Komununa San-centro. Ŝi esperantistiĝis en la jaro 1981 en Rijeka kaj ekde tiam estis membro de la Esperanto-societo Rijeka. Dum la1980-aj jaroj ŝi gvidis plurajn kursojn de Esperanto en la Elementa lernejo *Vladimir Gortan* en sia urbo. Ŝi forpasis en Rijeka, la 1-an de julio 2026-a.

## *111-a UNIVERSALA KONGRESO EN GRACO*

La 111- a UK okazis ekde de 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2026-a en Graco. La mirinda kongresejo estis Congress Graz (eksa Ŝtiria Ŝparkaso). La kongreso estis dediĉita al *Volontulado en la servo de daŭripova evoluigo*, tre grava agado en la Esperantujo. Krom tiu ĉi ĉefa temo, kongreso enhavis ankoraŭ du gravajn partojn: Esperant -ologio kaj Internacia Kongresa Universitato. Kun multaj ekskursoj proponitaj ( ankaŭ unu al la najbara Slovenujo) estis vere malfacila tasko elekti kion fari.



*Komenco de la UK en Graco, en la Kongresa centro...*

Pro la proksimeco de la gastiganta urbo, multaj kroataj esperantistoj partoprenis en la kongreso: oficiale 14 kun iu(j) kiu volas esti anonima(j). Grandaj numeroj de Kroatoj influis ankaŭ la programon. Tiel, inter naŭ novaj titoloj, postmorta honora membreco estis aljuĝita al Ivo Osibov el Split ( vidu pasintan numeron de *Informilo*). En la sekcio dediĉita al gravaj esperantistoj Spomenka Štimec parolis pri Zlatko Tišljar, kaj liaj ideoj de klerirgo kaj speciale pri la *Zagreba metodo* de Esperanto instruado. Alia kroata esperantistino, Marija Belošević, kiu organizis la sekcion de *Kleriga lundo,* donis du prelegojn: unu kun B. Pietrzak al la sama sekcio pri radiosendoj, kaj alia pri la ĉefa temo.

En la muzika parto de la kongreso partoprenis la Kroata kulturo-arta metiista societo *Golub* (La kolombo) el Bjelovar, kiu prezentis *Kroatan muzikan bukedon* kaj Neven Mrzlečki, lingvisto kaj kantisto-membro de la Zagreba Opero.

La programo kaj la amuziĝo estis tiel belaj, ke partoprenantoj ne volis eliri de la kongresejo post la lasta *Inter-*

*nacia vespero.* Tamen, dum la sonoj de valso sonoris ekstere de la konstruaĵo, la organizantoj finfine sukcesis atingi sian celon. La eterna aŭstria spirito!




*.. kaj la fino dancante valson ekstere de la kongresejo*
(*verkis kaj fotis: A. Alebić-Juretić*)

## 92-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 92-a Itala kongreso de Esperanto okazis en Vico de Gargano, dum periodo 22a-29a aŭgusto 2026. Vico de Gargano estas urbeto en Apulio, regiono kun multaj naciaj identecoj: la greka , la albana kaj oni trovas ankaŭ



*Tio ne estas Dubrovnik jam la insulo Sankta Nikolo en Tremiti insuloj*

slavan ŝpuron. Ĉe la marbordo estas urbeto Peschici, kie en la10-a jarcento estis kolonio de slavaj piratoj de Neretvo, en la orienta flanko de Adriatika maro. Nun restis nur la nomo (Peschici= Sabletoj) kiu priskribas tien medion kun sablaj strandoj. Distanco inter Peschici kaj la kroata insulo Palagruža estas nur 32 km.
La natura Parko de Gargano estas ĝuste kontraŭ Dubrovnik aŭ Korčula, kaj havas similan klimaton, historion kaj arkitekturon. En tiu medio, la ĉefa temo de la renkonto estis *Esperanto: lingvo de paco kaj de defendo de identecoj.* En la lasta sekcio, Luca Coslovich prezentis la Grenlandan lingvon, Gianfranco Pfleger la Germanan el la limregiono Tirolo-Sudtirolo-Trentino kaj Ana Alebić-Juretić la fiuman dialekton el Rijeka.

(*verkis kaj fotis: A, Alebić-Juretić)*

## MEMORO AL VJEKOSLAV MORANKIĆ

La 27-an de septembro 2026, grupo de esperantistoj kaj familianoj el Rijeka: Pero Krstulović, Nirvana Ferletta, Damir kaj lia filo Armando Morankić ekskursis al Crikvenica. Tie ili vizitis la tombon de la longjara kaj tre grava prezidanto de Esperanto Societo Rijeka, Vjekoslav Morankić, kiu forpasis en 2022. La grupo haltis ĉe la loka tombejo, kie okazis mallonga sed kora socia momento.

*( verkis: L. Kik, fotis: D. Morankić)*



*Ĉe la tombo de Vjekoslav Morankić en Crikvenica.*




**Provleganto:**
**Elda Dörfler**